# LA RAJTO DE PIGRO

Paŭlo LAFARGUE

Broŝurservo de S.A.T.
Esperanto * F 47470 Beauville

# P. LAFARGUE

# RAJTO DE PIGRO

Esperantigis Kribo.

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
124A * 1978 * 4 FF

## Antaŭparolo

En la Komisiono de 1849 pri la unuagrada instruado, S-ro Thiers diris: "Mi volas tutpotencigi la influon de l' klerikaro, tial ke mi kalkulas kun ĝi por disvastigi tiun bonan filozofion,kiu instruas al la homo, ke ĝi estas sur ĉi tero por suferi kaj ne tiun alian filozofion, kiu male diras al la homo: "Ĝuu". S-ro Thiers formulis la moralon de la burĝa klaso,kies kruelan egoismon kaj malvastan inteligenton li korpigis.

Dum ĝi luktis kontraŭ la nobelaro, kiun helpis la klerikaro, la burĝaro fiere montris liberpenson kaj ateismon; sed, triumfinte, ĝi ŝanĝis siajn tonon kaj manieron; kaj hodiaŭ ĝi klopodas apogi per la religio sian ekonomian kaj politikan superregon. En la 15a kaj 16a jarcentoj, ĝi fervore reprenis la paganan tradicion kaj gloris la karnon kaj ties pasiojn, kiujn malaprobis la kristanismo; hodiaŭ, plenŝtopite de posedaĵoj kaj ĝuaĵoj, ĝi forneas la instruojn de siaj pensuloj, Rabelezo, Dideroto... kaj predikas abstinon al la salajruloj. La kapitalisma moralo, ridinda parodio de la kristana, anatemas la karnon de l'laboristo; ĝia idealo estas redukti la produktanton al la plej eta minimumo da bezonoj, forigi liajn ĝojojn kaj pasiojn kaj kondamni lin al la rolo de maŝino senĉese kaj sendanke funkcianta.

La revoluciaj socialistoj havas kiel taskon rekomenci la batalon, kiun faris la burĝaj filozofoj kaj pamfletistoj; ili devas sturmi la moralon kaj la sociajn teoriojn de l'kapitalismo; ili devas detrui, en la kapoj de la agonta klaso, la antaŭjuĝojn, kiujn semis la reganta klaso; ili devas proklami, fronte al la bigotoj de ĉiuj moraloj, ke la tero ĉesos esti la "plor-valo" de l'laboristo; ke en la estonta komunisma socio, kiun ni fondos "pace se eblos, perforte se ne", la homaj pasioj estos senbridaj, ĉar "ĉiuj estas nature bonaj, ni havos nenion por eviti, krom ilia misuzado kaj iliaj troigoj (1)", kaj tiuj estos evitataj nur per reciproka kontraŭbalanciĝo, nur per la

harmonia disvolviĝo de la homa korpo, ĉar, diras D-ro Beddoe "nur kiam raso atingas sian maksimumon da fizika disvolviĝo, tiam ĝi atingas sian maksimuman energion kaj moralan viglecon". Tia estis ankaŭ la opinio de l'granda naturalisto Karlo Darwin (2).

...

P.L.

Karcero de Sankta Pelagio, 1883.

# 1. Ruiniga dogmo

"Ni pigru por ĉio, krom por ami kaj trinki, krom por pigri." Lessing.

Stranga frenezo posedas la laboristajn klasojn de l' nacioj, kie regas la kapitalisma civilizo. Tiu frenezo kuntrenas sociajn kaj individuajn mizerojn, kiuj, de antaŭ du jarcentoj, turmentas la povran homaron. Tiu frenezo estas la amo al laboro, la malsana labor-pasio, ĝis-atinganta la vivfortojn de l'individuo kaj de ties idaro. Anstataŭ reagi kontraŭ tiu juĝdeflankiĝo, la pastroj, la ekonomikistoj, la moralistoj sanktegigis la laboron. Blindaj kaj mensbaritaj, ili volis esti pli saĝaj ol sia Dio; malfortaj kaj malestimindaj, ili volis rehonorigi kion ilia Dio malbenis. Mi, kiu ne pretendas esti kristano, ekonomiulo kaj moralulo, pri ilia juĝado mi apelacias al tiu de ilia Dio; pri la predikoj de ilia religia, ekonomia, liberpensanta moralo, mi apelacias al la teruraj konsekvencoj de l'laboro en la kapitalisma socio.

En la kapitalisma socio, la laboro kaŭzas ĉiun intelektan degeneron, ĉiun organan misformiĝon. Komparu la purra-

---

(1) Kartezio: "Les Passions de l'Ame".
(2) D-ro Beddoe: "Memoirs of the Anthropological Society; Karlo Darwin: "Descent of Man".

san ĉevalon de la Rothschild-aj staloj, kiun servas lakearo da dumanuloj, kun la peza bruto el la normandaj farmoj, kiu plugas la grundon, transportas la sterkon, engarbejigas la rikolton. Rigardu la noblan sovaĝulon,kiun la misiistoj de l'komerco kaj la komercistoj de l'religio ankoraŭ ne koruptis per la kristanismo, la sifiliso kaj la dogmo de l' laboro, kaj poste rigardu niajn mizerajn maŝin-servantojn. (1)

-------

(1) La eŭropaj esploristoj ekhaltas, mirigate antaŭ la korpa beleco kaj la nobla aspekto de l'homoj el la primitivaj popoloj, ne makulitaj de tio, kion Paeppig nomis la "venena blovo de la civilizo". Parolante pri la praloĝantoj de la Oceaniaj insuloj, Lordo Georgo Campbell skribis: "En la mondo ne ekzistas popolo pli okulfrapa ĉe la unua ekvido. Ilia glata, hele kuprokolora haŭto, iliaj orkoloraj kaj krispaj haroj, ilia bela kaj ĝoja vizaĝo, unuvorte ilia tuta persono konsistigis novan kaj belegan specimenon de "genus homo"; ilia korpa aspekto donis la impreson pri raso supera al la nia". La civilizuloj de l'antikva Romio,la Cezaro, Tacito, same admire kontemplis la Ĝermanojn de la komunistaj triboj, kiuj invadis la Romian Imperion. Same kiel Tacito, Salviano, la pastro de l'5a jc., kiun oni kromnomis la "episkopa mastro", citis la barbarojn kiel ekzemplojn al la civilizitoj kaj al la kristanoj: "Ni estas malĉastaj meze de l'barbaraj, pli ĉastaj ol ni. Eĉ pli, la barbaroj estas ŝokitaj de niaj malĉastaĵoj, la Gotoj ne toleras, ke estu inter ili diboĉuloj de la propra nacio; en ilia medio nur la Romianoj rajtas malvirti, pro la malinda privilegio de sia nacieco kaj de sia nomo.(La pederastio tiam estis tre laŭmoda inter la paganoj kaj la kristanoj...) La subpremitoj foriras ĉe la barbarojn por trovi humanecon kaj ŝirmejon" (De Gubernatione Dei). - La malnova civilizo kaj la naskiĝanta kristanismo koruptis la barbarojn de l'malnova mondo, samkiel la maljuniĝinta kristanismo kaj la moderna kapitalisma civilizo koruptas la sovaĝulojn de l'nova mondo.

S-ro F. Le Play,kies observtalenton oni devas agnoski, dum oni forneas liajn sociologiajn konkludojn, diras en sia libro "La eŭropaj laboristoj" (1885): "La inklino de l'Baŝkiroj por la mallaboro (la Baŝkiroj estas duonnomadaj paŝtistoj el la azia flanko de Uralo), la ripozamuzoj de la nomada vivo, la kutimoj de meditado, kiujn ili naskas ĉe la

Kiam en nia civilizita Eŭropo, oni volas retrovi spuron de l'origina belo de l'homo, oni devas iri serĉi ĝin ĉe la nacioj, kie la ekonomiaj antaŭjuĝoj ankoraŭ ne elradikiĝis la malamon al laboro. Hispanio, kiu, ve! degeneras, ankoraŭ povas sin flati posedi malpli da fabrikoj ol ni da karceroj kaj kazernoj; sed la artisto ĝojas, admirante la maltiman Andaluzon, brunan kiel kaŝtanoj, rektan kaj flekseblan kiel ŝtala stango; kaj la homa koro ektremas, aŭdante la almozulon belege paradantan en sia truita "capa" (mantelo) kaj nomi "amigo" (amiko) dukojn de Ossuna. Por la Hispano, ĉe kiu la primitiva animalo ne atrofiiĝis, la laboro estas la plej aĉa el la sklavecoj (2).

Ankaŭ la grandepokaj Grekoj sentis nur malestimon por laboro: nur la sklavoj rajtis labori. La libera homo konadis nur la korpajn ekzercojn kaj la ludojn de l'inteligento. Tio estis ankaŭ la epoko, kiam oni marŝis kaj spiris en la popolo de Aristotelo, Fidiaso, Aristofano; la epoko, kiam manpleno da bravuloj venkegis en Maratono la hordojn el Azio, kiun Aleksandro estis baldaŭ konkeronta. La antikvaj filozofoj instruis la malestimon por laboro, tiu malnobligo de l'libera homo; la poetoj prikantis la pigron, tiun donacon de l'Dioj:

O Meliboe, Deus nobis haec otia fecit (3)

Kristo, en sia surmonta parolado, predikis la pigron:

-------

plej naturdotitaj individuoj, ofte donas al tiuj ĉi distingitecon en la gestoj, subtilecon en la inteligento kaj la juĝkapablo, kiujn oni malofte rimarkas ĉe la sama socinivelo en pli evoluinta civilizo... Plej naŭzas ilin la agrikulturaj taskoj; ili ĉion faras plivole ol akcepti la agrikulturistan metion". Efektive, agrikulturo estas la unua manifestiĝo de la servuteca laboro en la homaro. Laŭ la Biblia tradicio, la unua krimulo, Kaino, estas agrikulturisto.

(2) La hispana proverbo diras: "Descansar es salud" (Ripozo estas sano).

(3) "Ho, Melibe, iu Dio donis al ni tiun senfarecon". Vergilio. "Bukolikoj" (Vd. la aldonon).

"Kontemplu la kreskadon de la kamp-lilioj, ili nek laboras nek ŝpinas, kaj tamen, tion al vi mi diras, Salomono, en sia tuta gloro, ne estis pli brile vestita". (4)

Jehovo, la barba kaj malloga dio, montris al siaj adorantoj la gravegan ekzemplon pri ideala pigro; post ses tagoj da laboro li ripozis eterne.

Male, por kiuj rasoj la laboro estas organisma necesaĵo? La Aŭvernoj; la Skotoj, tiuj Aŭvernoj el Britio; la Galicianoj, tiuj Aŭvernoj el Hispanio; la Pomeroj, tiuj Aŭvernoj el Azio. En nia socio, kiuj klasoj amas la laboron pro la laboro? La bienposedantaj kamparanoj, la etburĝoj, unuj kurbigitaj al siaj kampoj, la aliaj alkutimaĉigitaj al siaj butikoj, moviĝas samkiel talpo en ties subtera galerio, kaj neniam rerektiĝas por trankvile rigardi la naturon.

Kaj tamen la proletaro - la granda klaso, kiu entenas ĉiujn produktantojn de l'civilizitaj nacioj, la klaso,kiu, emancipiĝante, emancipos la homaron el la sklavaĉa laboro kaj faros el la homa animalo liberan estulon - la proletaro, perfidante siajn instinktojn, miskonante sian historian mision, sin lasis perversigi per la labordogmo. Kruda kaj terura estis ĝia puno. Ĉiuj individuaj kaj sociaj mizeroj naskiĝis el la pasio por laboro.

## 2. Benoj al laboro

En 1770 aperis en Londono anonima verkaĵo titolita "An Essay on trade and Commerce" (Eseo pri negoco kaj komerco). Tiuepoke ĝi havis certan disfamiĝon. Ĝia aŭtoro, granda filantropo, indignis pro tio, ke
"la manufaktura plebo de Anglio enkapigis al si la fiksan ideon, ke, kiel Angloj, ĉiuj individuoj konsistigantaj tiun plebon, havas, pro ties naskiĝa rajto, la privilegion esti pli liberaj kaj pli sendependaj ol la laboristoj de kiu ajn alia eŭropa lando. Tiu ideo povas esti utila por la soldatoj, kies maltimon ĝi stimulas; sed ju

---

(4) Evangelio laŭ S-ta Mateo, ĉap. VI.

malpli ĝi influas la manufakturistojn, des pli bone por ili kaj por la Ŝtato. Laboristoj devus neniam sin kredi sendependaj de siaj superuloj. Ege danĝeras, kuraĝigi tiajn entuziasmojn en komerca Ŝtato kia estas la nia, kie eble la sep okonoj el la loĝantaro havas nur iom aŭ neniom da posedaĵo. La kuracado ne estos kompleta, tiom longe dum niaj malriĉuloj el la industrio ne rezignos labori ses tagojn por la sama sumo, kiun ili gajnas en kvar".

Tiel, proksimume unu jarcenton antaŭ Guizot (Gizo),oni malkaŝe predikis en Londono la laboron kiel bremson al la noblaj pasioj de l'homo.

"Ju pli laboros miaj popoloj, des malpli estos da malvirtoj, skribis Napoleono en Osterode, la 5an de majo 1807 (...) kaj mi pretus ordoni, ke dimanĉe, post la diserva horo, la butikoj estu malfermitaj kaj la laboristoj resenditaj al sia laboro".

Por elradikigi la mallaboremon kaj submeti la fieremon kaj sendependemon, kiujn ĝi naskas, la aŭtoro de l' "Essay on trade" proponis enkarcerigi la malriĉulojn en la idealajn laborejojn (ideal workhouses), kiuj fariĝus "terurejoj, kie oni laborigus 14 horojn ĉiutage, tiel ke, post subtraho de la manĝtempo, restus 12 plenaj kaj kompletaj laborhoroj".

Dekdu horoj da laboro ĉiutage, jen la idealo de l'filantropoj kaj moralistoj 18-jarcentaj. Kiom ni superis tiun "nec plus ultra" ! La modernaj laborejoj fariĝis idealaj pundomoj, kien oni enkarcerigas la laboristajn amasojn, kie oni kondamnas je 12-14 horoj da punlaboro ne nur la virojn, sed ankaŭ la virinojn kaj la infanojn (1)!

-------

(1) En la unua kongreso pri bonfarado en Bruselo en 1857, unu el la plej riĉaj manufaktur-posedantoj el Marquette, apud Lillo, S-ro Scrive, aplaŭdate de la kongresanoj, rakontis kun la plej nobla kontentiĝo pro la plenumita laboro: "Ni enkondukis kelkajn distrorimedojn por la infanoj. Al ili ni instruas kanti dum la laboro, ankaŭ kalkuli, laborante; tio distras ilin kaj igas ilin kuraĝe akcepti tiujn dekdu laborhorojn necesajn por havigi al ili vivrimedojn". Dekdu horoj da laboro, kaj kia laboro! truditaj al malpli ol 12-jaraj infanoj! La materialistoj ĉiam bedaŭros, ke ne ekzistas infero por tie alnajli tiujn kristanojn, tiujn filantropojn, turmentistojn de l'infanaro!

Kaj kiam oni memoras, ke la filoj de la Teror-heroo sin lasis malnobligi per la religio de laboro tiagrade,ke ili akceptis post 1848 kiel revolucian konkeraĵon la leĝon limigantan al dek horoj la laboron en la fabrikoj; ili proklamis kiel revolucian principon la rajton al laboro. Honton al la franca proletaro! Nur sklavoj kapablus tian aĉaĵon. Necesus dudek jaroj da kapitalisma civilizo al Greko de la heroa epoko por koncepti tian malnoblaĵon.

Kaj se la doloroj de l'trudlaboro, se la torturoj de l' malsato falis sur la proletaron pli multaj ol la Bibliaj akridoj, estas ĝi mem, kiu vokis ilin.

Tiun laboron, kiun en junio 1848 la laboristoj postulis kun armiloj en la manoj, ili trudis al siaj familioj; ili liveris al la baronoj de l'industrioj siajn edzinojn kaj infanojn. Propramane ili detruis sian hejmon; propramane ili elsekigis la lakton de siaj edzinoj; la kompatindulinoj, gravedaj kaj mamnutrantaj, devis iri en la minejojn kaj la manufakturojn por streĉi sian spinon kaj ellacigi siajn nervojn; propramane ili disrompis la vivon kaj la viglon de siaj infanoj. - Honton al la proletoj! Kie estas tiuj babilulinoj, pri kiuj parolas niaj mezepokaj fabeloj kaj niaj malnovaj rakontoj, parolaŭdacaj, vortsinceraj,amantinoj de la rava botelo? Kie estas tiuj petolulinoj,ĉiam trotantaj, ĉiam kuirantaj, ĉiam kantantaj, ĉiam semantaj la vivon kaj naskantaj la ĝojon, sendolore akuŝantaj sanajn kaj viglajn idojn?... Ni havas nun la fabrik-knabinojn kaj virinojn, malviglajn, palkolorajn florojn, kun senruĝbrila sango, kun ruiniĝinta stomako, kun moliĝintaj membroj!... Ili neniam konis la fortikan plezuron kaj ne scius malprude rakonti kiel oni rompis al ili la ŝelon! - Kaj la infanoj? Dekdu horojn da laboro al la infanoj. Ho mizero! - Sed ĉiuj Julo Simon el la Akademio de l'moralaj kaj politikaj sciencoj, ĉiuj Germiny-oj el la jezuitaro, ne povus elpensi pli brutigan malvirton por la inteligento de l'infanoj,pli koruptan por iliaj instinktoj, pli detruan por ilia organismo, ol la laboron en la malpura atmosfero de la kapitalista laborejo.

Onidire, nia epoko estas la jarcento de l'laboro; efektive ĝi estas la jarcento de la doloro, de la mizero kaj de la korupto.

Kaj tamen la filozofoj, la burĝaj ekonomikistoj, de la

penige konfuzą Aŭgusto Comte ĝis la ridinde klara Leroy-Beaulieu, la burĝaj literaturistoj, de la ĉarlatane romantika Viktoro Hugo ĝis la naive groteska Paŭlo de Kock, ĉiuj ekkantis la naŭzajn kantojn honore al la Dio Progreso, la plej aĝa filo de l'Laboro. Laŭ ili, la feliĉo estis regonta sur la tero: jam oni sentis ties alvenon. Ili iris en la pasintajn jarcentojn esplorfosi la feŭdajn polvon kaj mizeron por realporti malhelajn valorigilojn por la nuntempaj delicoj. Kiel ili tedis nin, tiuj plensatuloj, tiuj kontentuloj, antaŭe ankoraŭ membroj de la grandsinjora servistaro, hodiaŭ plumlakeoj de la burĝaro, grase rentumitaj; kiel ili tedis nin per la kamparano de la retorikisto La Bruyère! Nu! Jen la brila pentraĵo de la proletaraj ĝuoj en la jaro 1840 de kapitalisma progreso, pentrita far unu el ilia tendaro, far D-ro Villermé, Institutmembro, la sama, kiu en 1848 estis ano de tiu sciencularo (anis ankaŭ Thiers, Cousin, Passy, Blanqui la akademiano), kiu disvastigis ĉe la popolo la stultaĵojn de la ekonomio kaj moralo.

Pri la manufakturéca Alzaco parolas D-ro Villermé, pri la Alzaco de Kestner, Dollfus, tiuj floroj de l'filantropio kaj de l'industria respublikanismo. Sed antaŭ ol la doktoro pentros antaŭ ni la proletarajn mizerojn, ni aŭskultu alzacan manufakturposedanton, S-ron Th. Mieg, el la firmao Dollfus, Mieg kaj K-io, priskribantan la situacion de la malnovinsdustria metiisto:

"En Mulhaŭzo, antaŭ kvindek jaroj (en 1813, dum naskiĝis la moderna meĥanika industrio) ĉiuj laboristoj tie naskiĝis, loĝante en la urbo kaj la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj preskaŭ ĉiuj posedante domon kaj ofte kampeton"(2).

Tio estis la ora tempaĝo de l'laboristo. Sed tiam la alzaca industrio ne inundis la mondon per siaj kotonaĵoj kaj ne milionuligis siajn Dollfus kaj siajn Koechlin. Sed dudek kvin jarojn poste, kiam Villermé vizitis Alzacon, la moderna minotaŭro, la kapitalista laborejo estis konkerinta la landon; en sia konsumavido je homa laboro ĝi estis perforte forpreninta la laboristojn for el iliaj hejmoj por

--------

(2) Parolado en la Internacia Societo pri praktikaj soci-ekonomiaj studoj de Parizo, en majo 1863, kaj publikigita en "L'Economiste Français" samepoka.

pli bone tordi ilin kaj pli bone elŝprucigi la laboron, kiun ili entenis. Milope la laboristoj alkuris ĉe la fajfado de l'maŝino.

"Granda nombro, diras Villermé, kvinmil el deksep mil, estis devigataj, pro la multkosto de l'luprezoj, loĝi en la najbaraj vilaĝoj, Kelkiuj loĝis je naŭ kilometroj for de la manufakturo, kie ili laboris.

En Mulhaŭzo, en Dornaĥo, la laboro komenciĝis je la kvina matene kaj finiĝis je la kvina vespere, tiel somere kiel vintre (...). Indas vidi ilin alvenantaj ĉiumatene en la urbon kaj ĉiuvespere forirantaj. Estas inter ili arego da palaj, malgrasaj virinoj, nudpiede marŝantaj meze de l'koto kaj kiuj, pro manko de pluvombrelo, kovras sian kapon, kiam pluvas aŭ neĝas, per siaj antaŭtukoj aŭ subjupoj por ŝirmi la vizaĝon kaj la kolon. Estas ankoraŭ pli granda nombro da junaj infanoj, ne malpli malpuraj, ne malpli pale malgrasegaj, ĉifvestitaj, tute grasemakulitaj pro la maŝin-oleo, kiu falas sur ilin dum ili laboras. Ĉi-lastaj, pli bone ŝirmitaj kontraŭ la pluvo pro la netraakvigebleco de siaj vestaĵoj, eĉ ne havas ĉebrake, kiel la virinoj pri kiuj mi ĵus parolis, korbon, kie troviĝas la taga manĝprovizo; sed ili portas en la mano, aŭ kaŝas sub sia jako aŭ kiel ili povas, la panpecon, kiu devos nutri ilin ĝis la horo de l'rehejmeniro.

Tiel al la laciĝo pro ege longa tago - ĉar almenaŭ 15-hora - aldoniĝas por tiuj kompatinduloj tiu pro la tiel oftaj, tiel penigaj iroj-revenoj. Rezulte, vespere ili hejmen alvenas, premegite de la dorm-bezono, kaj la morgaŭon ili eliras, ne tute ripozinte, por troviĝi ĉe la laborejo je la malferm-horo".

Jen nun la loĝejaĉoj, kie kunpuŝiĝis tiuj loĝantaj en la urbo:

"Mi vidis en Mulhaŭzo, en Dornaĥo, tiajn aĉajn loĝejojn, en kiuj du familioj kuŝis ĉiu en angulo, sur la surkahelplanka pajlo, kiun retenis du tabuloj... Tiu mizero, en kiu vivas la laboristoj de l'kotonindustrio en la departemento Alta Rejno, estas tiel profunda, ke ĝi rezultigas, ke dum en la familioj de l'fabrik-negocistoj, drapistoj, uzin-direktoroj, duono el la infanoj atingas la dudek unuan jaron, tiu sama duono ĉesas ekzisti antaŭ du plenaj jaroj en la familioj de l'teksistoj kaj de l'laboristoj de la kotonteksejoj".

Parolante pri la laboro en laborejo, Villermé aldiras:

"Tio ja ne estas laboro, tasko, sed torturo, kaj ĝin oni trudas al ses- aŭ okjaraj infanoj (...) Estas tiu longa ĉiutaga torturado, kiu subfosas precipe la laboristojn en la kotonteksejoj".

Kaj pri la labordaŭro Villermé rimarkigas, ke la punlaboruloj laboris nur dek horojn, la Antiliaj sklavoj meznombre naŭ horojn, dum ekzistis en la Francio, kiu faris la Revolucion de '89, kiu proklamis la pompajn Homajn Rajtojn, manufakturoj en kiuj la labortago daŭris dekses horojn, el kiuj oni konsentis al la laboristoj unu horon kaj duonon por la manĝoj (3).

Ho! mizera aborto de la revoluciaj principoj de l' burĝaro! Ho, vea donaco de ĝia dio Progreso! La filantropoj aklamas kiel homarajn bonfarantojn tiujn, kiuj, por riĉiĝi pigrante, donas laboron al la malriĉuloj; preferindus semi la peston, veneni la fontojn, ol starigi fabrikon meze de kampara loĝantaro. Enkonduku la fabriklaboron, kaj adiaŭ ĝojo, sano, libero, adiaŭ ĉio faranta la vivon bela kaj travivinda (4).

---

(3) L.R. Villermé. "Tableau de l'état physique et moral des ouvriers dans les fabriques de coton, de laine et de soie" (Priskribo pri la fizika kaj morala stato de la laboristoj en la koton-, lan- kaj silk-fabrikoj) 1840.

Ne estis tial ke Dollfus, Koechlin kaj aliaj alzacaj fabrikistoj, estis respublikanoj, patriotoj kaj protestantaj filantropoj, ke ili tiel traktis siajn laboristojn; ĉar Blanqui la akademiano, Reybaud, la prototipo de Jeromo Paturot, kaj Julo Simon, la politika ĉiofaranto, konstatis la samajn mildaĵojn por la laborista klaso ĉe la tre katolikaj kaj tre monarkiemaj fabrikistoj el Lillo kaj Liono. Tio estas ja kapitalistaj virtoj rave harmoniantaj kun ĉiuj politikaj kaj religiaj konvinkoj.

(4) La Indianoj de la militemaj triboj el Brazilio mortigas siajn kriplulojn kaj siajn maljunulojn. Ili esprimas sian amikecon, ĉesigante vivon, kiun ne plu ĝojigas bataloj, festoj kaj dancoj. Ĉiuj primitivaj popoloj tiel pruvis sian amon al siaj kunuloj; la Masaĵetoj el la Kaspia maro (Herodoto) samkiel la Uenoj el Germanio kaj la Keltoj el Gallio. En la svedaj preĝejoj ankoraŭ lastatempe

Kaj la ekonomikistoj ripetadas al la laboristoj:

"Laboru por pliigi la socian riĉecon!" Kaj tamen ekonomikisto, Destut de Tracy, respondas al ili: "En la malriĉaj nacioj, tie la popolo bonfartas; en la riĉaj nacioj, tie ĝi kutime estas malriĉa". Kaj lia disĉiplo Cherbuliez jene daŭrigas:

"La laboristoj mem, kunhelpante en la akumulado de l' produktivaj kapitaloj, kontribuas al la okazaĵo, kiu frue aŭ malfrue devas senigi ilin je parto de ilia salajro".

Sed surdigite kaj stultigite per sia propra hurlado, jen la ekonomikistoj respondas: "Laboru, laboradu por krei vian bonfarton!" Kaj nome de la kristana indulgo, pastro el la anglikana Eklezio, reverendo Townshend ĉantas: "Laboru, laboru tage-nokte; laborante, vi kreskigas vian mizeron kaj via mizero evitas al ni trudi al vi la laboron per la leĝ-efiko. La leĝa labortrudo estas tropeniga, postulas tro da perforto kaj tro bruas; male, la malsato estas ne nur paca, silenta, senĉesa premado, sed kiel la plej natura instigilo de laboro kaj de industrio ĝi naskas la plej grandajn strebadojn".

Laboru, laboru, proletoj, por pligrandigi la socian riĉecon kaj viajn individuajn mizerojn; laboru, laboru, por ke, plimalriĉiĝante, vi havu pli da kialoj por labori kaj mizeri.

Tial ke, aŭskultante la trompajn parolojn de la ekonomikistoj, la proletoj sin fordonis korpe kaj anime al la malvirto de laboro, ili puŝas la tutan socion en tiujn industriajn krizojn de superproduktado, kiuj skuas la socian organismon. Tiam, ĉar tro abundas la varoj kaj mankegas la aĉetantoj, la laborejoj fermiĝas kaj la malsato vipas la laboristan popolon per sia milrimena vipo. La proletoj, brutigite per la dogmo de laboro, ne komprenante, ke la kromlaboro, kiun ili puntrudis al si dum la periodo de laŭdira prospero, estas la kaŭzo de ilia nuna mizero, anstataŭ kuri al la tritikgrenejo kaj krii: "Ni malsatas kaj volas manĝi!... Vere ni havas eĉ ne unu groŝon, sed kvan-

-------

oni konservis la t.n. familiajn klabojn, kiuj utilis por liberigi la parencojn el la malĝojaĵoj de la maljunaĝo. Kiom degenerintaj estas la modernaj proletoj, pacience akceptante la terurajn mizerojn de la fabrik-laboro!

kam mizerulој, ni estas tiuj, kiuj rikoltis la tritikon kaj la vinberojn..."

– Anstataŭ sieĝi la magazenojn de S-ro Bonnet el Jujurieux, la inventinto de l'industriaj monaĥinejoj, kaj krii: "S-ro Bonnet, jen viaj ovalistaj (5) laboristinoj, silktordistinoj, ŝpinistinoj, teksistinoj, ili frostotremas sub siaj flikaĉitaj kotonaĵoj, kiuj povus ĉagreni judan okulon, kaj tamen estas ili, kiuj ŝpinis kaj teksis la silkrobojn de la publikulinoj el la tuta kristanaro. La kompatindulinoj, laborante dektri horojn ĉiutage, ne havis la tempon pensi pri sia tualeto, nun ili senlaboras kaj povas susurigi la silkaĵojn, kiujn ili ellaboris. Tuj kiam ili perdis siajn laktodentojn, ili sin oferis por via riĉeco kaj vivis en abstino; nun ili havas libertempon kaj volas iom ĝui la fruktojn de sia laboro. Nu, S-ro Bonnet, liveru viajn silkaĵojn, S-ro Harmel disponigos sian muslinon, S-ro Pouyer-Quertier siajn kalikotojn, S-ro Pinet siajn botetojn por iliaj karaj piedetoj malvarmaj kaj malsekaj... Viglaj kaj vestitaj de piedo ĝis kapo, ili plezurigos vian okulon.

Nu, ne hezitu, vi estas la amiko de l'homaro, ĉu ne? Kaj kristano, krome? – Disponigu al viaj laboristinoj la riĉaĵon, kiun ili konstruis al vi per karno el sia karno. – Ĉu vi estas amiko de komerco? – Faciligu la var-cirkuladon; jen jam trovitaj konsumantoj; malfermu al ili senliman krediton. Vi ja estas devigata konsenti krediton al negocistoj, kiujn vi neniel konas, kiuj donis al vi nenion, eĉ ne unu glason da akvo. Viaj laboristinoj senŝuldiĝos kiel ili povos; se, kiam alvenos la pagdato, ili fuĝos spite sian subskribon, vi deklaros ilin bankrotantinoj, kaj se ili havos nenion konfiskeblan, vi postulos, ke ili pagu per preĝoj: ili sendos vin en paradizon, pli bone ol viaj nigraj sakoj kun ties tabakŝtopita nazo".

– Anstataŭ profiti la krizmomentojn por ĝenerala distribuado de l'produktoj kaj por universala ĝojado, la laboristoj, malsategante, iras kapimpeti kontraŭ la pordojn de la laborejo. Kun malsane palaj vizaĝoj, malgrasiĝintaj korpoj, kompatindaj paroladoj, ili sieĝas la fabrikestrojn: "Bona S-ro Chagot, milda S-ro Schneider, donu laboron al ni, turmentas nin ne la malsato, sed la laborpasio!" Kaj tiuj mizeruloj, kiuj apenaŭ kapablas plustari, vendas dekdu kaj

-------
(5) ovalisto: laboristo, kiu ovaligas la silkon.

dekkvar horojn da laboro duoble malpli kare ol kiam ili havis laboron laŭvole. Kaj la industriaj filantropoj jen profitas la sendungon, fabrikante malpli koste.

Se la industriaj krizoj sekvas la periodojn de superlaboro tiel fatale kiel la nokto sekvas la tagon, trenante post si la devigan senlaborecon kaj la sensolvan mizeron, ili sekvigas ankaŭ senindulgan bankroton. Tiom longe, dum la fabrikestro havas krediton, li malstreĉas la bridon al la laborfrenezo, li monpruntas kaj plue monpruntadas por liveri la krudan materialon al la laboristoj. Li produktigas, sen pripensi, ke la merkato ŝtopiĝas kaj ke, se liaj varoj ne atingas disvendadon, liaj biloj ja atingos la pagdaton. Premate, li iras plorpeti al la Judo, li ĵetas sin al liaj piedoj, ofertas al li sian sangon, sian honoron. "Iom da oro pli taŭgus por mia afero, respondas la Rothschild-o, vi havas 20 000 ŝtrumpparojn en magazeno, ili valoras po dudek soldoj, mi prenas ilin je 4 soldoj". Akirinte la ŝtrumpojn, la Judo vendas ilin po 6 kaj 8 soldoj kaj enpoŝigas la viglajn centsoldajn monerojn, kiuj ŝuldas ion al neniu; sed la fabrikestro retroiris por pli bone salti. Fine alvenas la disfuĝego kaj la magazenoj malŝtopiĝas; oni tiam forĵetas tiom da varoj tra la fenestrojn, ke oni ne scias kiel ili eniris tra la pordo . Per centoj da milionoj kalkuliĝas la valoro de la detruitaj varoj; en la pasinta jarcento ilin oni forbruligis aŭ ĵetis en la akvon (6).

Sed antaŭ ol atingi tiun konkludon, la fabrikestroj trakuras la mondon, serĉante merkaton por la stakiĝantaj varoj; ili devigas sian registaron aneksi Kongolandojn, ekkapti Tonkinojn, forkanoni la muregojn de Ĉinio, por ke ili tie vendu siajn kotonaĵojn. En la pasintaj jarcentoj, Francio kaj Anglio interbatalegis por havi la ekskluzivan privilegion vendi en Ameriko kaj en Hindio. Miloj da junaj kaj viglaj viroj ruĝigis la marojn per sia sango, dum la koloniaj militoj de l' 11a, 16a kaj 18a jarcentoj.

Samkiom la varoj, abundas la kapitaloj. La financistoj ne scias kien investi ilin; tiam ili iras ĉe la feliĉajn

-------

(6) Ĉe la industria Kongreso okazinta en Berlino, la 21an de januaro 1879, oni taksis je 568 milionoj da frankoj la perdon, kiun suferis la fer-industrio en Germanio dum la lasta krizo.

naciojn, kiuj sungapas, fumante cigaredojn, kaj tie instalas fervojojn, starigas fabrikojn kaj enportas la malbenon de l'laboro. Kaj tiu eksportado de francaj kapitaloj finiĝas iun belan matenon per diplomatiaj komplikaĵoj: en Egiptio estis ekbatalontaj Francio, Anglio kaj Germanio, por scii kiuj estos la unue pagotaj uzuristoj; per militoj en Meksikio, kien oni sendas la francajn soldatojn roli kiel asignistoj por enkasigi aĉajn ŝuldojn (7).

Tiuj individuaj kaj sociaj mizeroj, kvankam grandaj kaj sennombraj ili estas, kvankam eternaj ili aspektas, svenos samkiel la hienoj kaj ŝakaloj pro la leona alproksimiĝo, kiam la proletaro diros: "Mi tion volas". Sed por atingi la konsciiĝon pri sia forto la proletaro devas treti la antaŭjuĝojn de la kristana, ekonomia, liberpensula moralo; necesas, ke ĝi revenu al siaj naturaj instinktoj, ke ĝi proklamu la Rajtojn de pigro, miloble pli sanktajn ol la ftizaj Homaj Rajtoj, elpensitaj de la metafizikistaj advokatoj de la burĝaj revolucioj; ke ĝi trudu al si labori nur tri horojn en la tago, pigri kaj festeni la reston de l'tago kaj nokto.

Ĝis nun mia tasko estis facila, mi devis nur priskribi realajn, ve! de ĉiuj konatajn malbonaĵojn. Sed konvinki la proletaron, ke perversa estas la al ĝi inokulita dogmo, ke la senbremsa laborego, al kiu ĝi sin fordonis jam de la jarcenta komenco, estas la plej terura plago, kiu iam trafis la homaron; ke la laboro fariĝos plezurspico de la pigro,

---

(7) "La Justice" de S-ro Clémenceau, en sia financa rubriko, diris la 6an de aprilo 1880: "Ni aŭdis subteni tiun opinion, ke, sen Prusio, la miliardoj de la 1870-milito estus tutsame perditaj de Francio, kaj tio, en formo de monpruntoj periode emisiataj por ekvilibrigi fremdajn buĝetojn; tio estas ankaŭ nia opinio". Oni taksas je kvin miliardoj la perdon de la anglaj kapitaloj en la monpruntoj de la Sudamerikaj Respublikoj. La francaj laboristoj ne nur produktis la kvin miliardojn pagitajn al S-ro Bismark; sed ili plu servas la interezojn de la militmonkompenso al la Ollivier, Girardin, Bazaine kaj aliaj posedantoj de rentpaperoj, kiuj estigis la militon kaj la disvenkiĝon. Tamen restas al ili konsolo: tiuj miliardoj ne okazigos monkompensigan militon.

bonfara ekzerco por la homa organismo, utila pasio por la socio, nur kiam ĝi estos prudente reguligita kaj limigita je maksimume tri horoj en la tago, tio estas malfacilega tasko superanta miajn fortojn. Nur fiziologoj, higienistoj, komunistaj ekonomikistoj povus ĝin entrepreni. En la sekvontaj paĝoj mi limigos min demonstri, ke pro la ekzisto de la modernaj produktiloj kaj ties senlima produktivo, nepre necesas regi la deliran pasion de l'laboristoj por laboro kaj devigi ilin konsumi la varojn, kiujn ili produktas.

# 3. Tio sekvanta la superproduktadon

Greka poeto el la Cicerona periodo jene prikantis la inventon de l'akvomuelilo (por mueli la grenon): ĝi estis emanciponta la sklavajn virinojn kaj revenigonta la oran tempaĝon:

"Domaĝu la brakon, kiu turnigas la muelŝtonon, ho, muelistinoj, kaj dormu trankvile! Vane la koko vin avertu, ke tagiĝas! Dao trudis al la nimfoj la laboron de l'sklavoj kaj jen ili vigle saltetantaj sur la rado kaj jen la ekmovita akso ruliĝas kun ties radioj, turnigante la pezan rulŝtonon. Ni vivu per la vivo de niaj patroj kaj senfaraj ni ĝoju pro la donacoj, kiujn la diino konsentas".

Ve! Ne alvenis la ripozamuzoj, kiujn anoncis la pagana poeto; la blinda, perversa kaj hommortiga pasio al laboro transformas la liberigan maŝinon en instrumenton servutigantan la liberajn homojn: ĝia produktiveco malriĉigas ilin.

Lerta laboristino faras per ŝpinilo nur kvin maŝojn en unu minuto, iuj rondtrikmaŝinoj faras tridek mil en la sama tempo. Ĉiu minuto ĉe la maŝino do ekvivalentas cent laborhorojn de l'laboristino; aŭ ĉiu laborminuto de la maŝino liveras al la laboristino dek tagojn da ripozo. Kio veras por la trik-industrio, tio pli malpli veras por ĉiuj industrioj, kiujn renovigis la moderna meĥaniko. Sed kion ni vidas? Laŭmezure kiel la maŝino perfektiĝas kaj reduktas la homan laboron kun senĉese kreskantaj rapideco kaj precizeco, la laboristo anstataŭ plilongigi sian ripozadon laŭproporcie, pliigas sian fervoron, kvazaŭ li volus riva-

li kun la maŝino. Ho! absurda kaj murda konkurado!

Por ke la konkurado de l'homo kun la maŝino libere disvolviĝu, la proletoj abolis la saĝajn leĝojn, kiuj limigis la laboron de l'metiistoj de la antikvaj korporacioj; ili forigis la feriojn (1).

Tial ke la tiamaj produktistoj laboris nur kvin tagojn el sep, ĉu ili ja kredas, kiel rakontas tion la mensogantaj ekonomikistoj, ke ili vivis nur per aero kaj freŝakvo? Nu! Ili havis libermomentojn por gustumi la ter-ĝojigaĵojn, por amori kaj ridegi; por ĝoje bankedi honore al la ĝojiga dio de l'Pigro. La moroza Anglio, enbigotigita en la protestantismo, tiam nomiĝis la "ĝoja Anglio" (Merry England). Rabelezo, Kvevedo, Servantes, la nekonataj aŭtoroj de l'pikareskaj romanoj, eksalivigas nin per siaj pri-

-------

(1) Sub la Malnova Reĝimo, la leĝoj de l'Eklezio garantiis al la laboristo 90 ripoztagojn (52 dimanĉojn kaj 38 feriojn) dum kiuj estis strikte malpermesate labori. Tio estis la granda krimo de l'katolikismo, la ĉefa kaŭzo de la nereligiemo de l'industria kaj komerca burĝaro. Sub la Revolucio, tuj kiam ĝi ekregis, ĝi abolis la feriojn kaj anstataŭigis la septagan semajnon per la dektaga. Ĝi liberigis la laboristojn el la Eklezia jugo por pli bone submeti ilin al la jugo de l'laboro.

La malamo kontraŭ la ferioj aperas nur kiam la moderna industria kaj komerca burĝaro konsistiĝas, inter la 15a kaj 16a jarcentoj. Henriko la Kvara petis de la papo ilian malpliigon; li rifuzis ĉar "unu el la hodiaŭaj herezaĵoj koncernas la festotagojn" (letero de la kardinalo de Ossat) Sed en 1666 Péréfixe, ĉefepiskopo de Parizo, forigis 17 el ili en sia diocezo. La protestantismo, kiu estis la kristana religio adaptita al la novaj bezonoj industriaj kaj komercaj de la burĝaro, malpli zorgis pri la popola ripozo; ĝi eltronigis la sanktulojn en la ĉielo por aboli surtere iliajn festojn.

La religia reformo kaj la libera filozofia penso estis nur pretekstoj, kiuj ebligis al la jezuita kaj avidega burĝaro forĵongli la festotagojn de l'popolo.

skriboj de tiuj monumentaj manĝodiboĉoj (2), en kiuj oni tiam regalis sin inter du bataloj kaj du detruadoj kaj en kiuj ĉio "glutiĝis per pelvoplenoj". Jordaens kaj la flandra skolo skribis ilin sur siaj ĝojigaj pentraĵoj. Sublimaj gargantuaj stomakoj, kio vi fariĝis? Sublimaj cerboj, kiuj ĉirkaŭis la tutan homan penson, kio vi fariĝis? Ni ja tre etiĝis kaj tre degeneris. La rabia bovino, la terpomo, la fuksina vino kaj la prusa brando lerte kombinitaj kun la deviga laboro malfortigis niajn korpojn kaj mallarĝigis niajn spiritojn. Kaj nun, kiam la homo malvastigas sian stomakon kaj kiam la mašino pligrandigas sian produktivecon, tiam la ekonomikistoj predikas la maltusanan teorion, la religion de abstino kaj la dogmon de laboro? Sed endus elŝiri el ili la langon kaj ĵeti ĝin al hundoj!

Tial ke la laborista klaso, kun sia simplaĉa sincero, lasis sin logi; tial ke, kun sia denaska impeto, ĝi sin ĵetegis blinde en la laboron kaj la abstinon, la kapitalista klaso troviĝis kondamnita al la pigro kaj al la deviga ĝuado, al la neproduktiveco kaj al la superkonsumado. Sed se la superlaboro de l'laboristo kontuzas lian karnon kaj dolorigas liajn nervojn, ĝi estas dolorplena ankaŭ por la burĝo.

La abstino, je kiu sin kondamnas la produktanta klaso, devigas la burĝaron sin dediĉi al la superkonsumado de l' produktoj, kiujn ĝi senorde manufakturas. Komence de la kapitalisma produktado, antaŭ unu du jarcentoj, la burĝo estis ordema, kun pacaj kaj moderaj moroj; li kontentiĝis per sia edzino aŭ proksimume; li trinkis nur laŭsoife kaj manĝis nur laŭ sia malsato. Li lasis al la korteganoj kaj al la korteganinoj la noblajn virtojn de la diboĉvivo. Ho-

---

(2) Tiuj pantagruelaj festoj daŭris dum semajnoj. Don Rodrigo de Lara konkeris sian fianĉinon, forpuŝante la Maŭrojn el Kalatravo la Malnova kaj la "Romancero" rakontas, ke:
"Las bodas fueron en Burgos, Las tornabodas en Salas:
En bodas y tornabodas Pasaron siete semanas.
Tantas vienen de las gentes, Que no caben por la plazas.."
(La nupto okazis en Burgos, la nuptoreveno en Salas; en nupto kaj nuptoreveno sep semajnoj pasis; alvenas tiom da homoj, ke la placoj ne povas ilin enteni). La homoj de tiu sepsemajna nupto estis la heroaj soldatoj de la militoj por sendependeco.

diaŭ ĉiu filo de riĉiĝinto sentas sin devigata disvolvi la prostituadon kaj enkurzigi (°) sian korpon por havigi celon al la laboro, kiun trudas al si la laboristoj de la hidrargominejoj (°); ĉiu burĝo gluteme ŝtopas sin per trufitaj kaponoj kaj Lafite-vino, por kuraĝigi la bredistojn el La Fleŝo kaj la vitistojn el la Bordoza regiono. Pro tiuj moroj la organismo rapide kadukiĝas, la haroj falas, la dentoj baznudiĝas, la trunko deformiĝas, la ventro tripleniĝas, la spirado iĝas malfacila, la movoj iĝas pezaj, la artikoj ankiloziĝas, la falangoj nodiĝas. Aliuloj, tro malfortikaj por elteni la lacigojn de l'diboĉo, sed dotitaj de vigla pretendemo, sekigas sian cerbon samkiel la Garnier-oj de la politika ekonomio, la Acollas-oj de jura filozofio, cerbumaĉante dormigajn libregojn por okupi la libertempon de l'kompostistoj kaj de l'presistoj.

La mondumaninoj vivas martirvivon. Por provi kaj reliefigi la feajn tualetojn, kiujn la kudristinoj mortigas sin por konstrui, de vespero ĝis mateno ili iras kaj venas de iu robo en alian; dum horoj ili fordonas sian kavan kapon al la har-artistoj, kiuj ĉiapreze volas satigi sian pasion por starigi falsajn hartuberojn. Rimenligite en siaj korsetoj, kun siaj piedoj premitaj en botetoj, dekoltite ĝis ruĝigi fajrobrigadanon, ili turniĝadas tutajn noktojn en siaj bonfaro-baloj, celante kolekti kelkajn soldojn por la malriĉularo. Sanktaj animoj!

Por plenumi sian duoblan socian funkcion de neproduktanto kaj superkonsumanto, la burĝo devis ne nur perforti siajn modestajn emojn, perdi siajn laborkutimojn de antaŭ du jarcentoj kaj diboĉi en senbremsa lukso, per trufitaj misdigestadoj kaj per sifilisaj ekscesoj, sed ankaŭ forpreni el la produktiva laboro grandegan kvanton da homoj por havigi al si helpantojn.

Jen kelkaj ciferoj, kiuj pruvas kiom kolosa estas tiu disperdo de produktivaj fortoj. Laŭ la popolnombrado de 1861, la loĝantaro de Anglio kaj Kimrio konsistis el 20 066 244 personoj, el kiuj 9 776 259 virseksaj kaj 10 289 965 in-seksaj. Se oni dekalkulas tiujn tro junajn

-------

(°) Tie, en la franca, troviĝis vortludo de P. Lafargue per "mercurialiser" (enkurzigi) kaj "mercure" (hidrargo) bedaŭrinde ne tradukebla en esperanton. Ndt.

aŭ tro maljunajn por labori, la neproduktivajn virinojn, adoleskantojn kaj infanojn, poste la ideologiajn profesiojn kiaj estas regantaro, polico, klerikaro, juĝistaro, armeo, prostituo, artoj, sciencoj ktp, kaj poste la homojn ekskluzive okupatajn manĝi alies laboron sub formo de bienrento, interezoj, dividendoj ktp, restas proksimume ok milionoj da ambaŭseksaj kaj ĉiomaĝaj individuoj, inkluzive de l'kapitalistoj oficantaj en la produktado, la komerco, la financo ktp. Inter tiuj ok milionoj oni nombras:

| | | |
|---|---|---|
| Agrikulturaj laboristoj (inkluzive de l'paŝtistoj, geservistoj loĝantaj ĉe la farmisto) | .... | 1 098 261 |
| Laboristoj el fabrikoj de kotono, lano, kanabo, lino, silko, trikaĵoj | .... | 642 607 |
| Laboristoj el la karb- kaj metal-minejoj | .... | 565 835 |
| Metalurgiaj laboristoj (altfornoj, laminatejoj..) | | 396 998 |
| Servista klaso | .... | 1 208 648 |

"Se oni adicias la laboristojn de l'teksfabrikoj kaj tiujn de l'karb- kaj metalminejoj, rezultas la nombro 1 208 442; se oni adicias la unuajn kaj tiujn de l'metalurgiaj uzinoj, rezultas sumo de 1 039 605 personoj, t.e. ĉiufoje pli eta nombro ol tiu de l'modernaj servistaj sklavoj. Jen la belega rezultato de la kapitalisma ekspluatado de l'maŝinoj" (3)

Al tiu tuta servista klaso, kies graveco indikas la gradon atingitan de la kapitalisma civilizo, necesas aldoni la multnombran klason de l'kompatindulo j okupataj ekskluzive por kontentigi la multelspezigajn kaj bagatelajn emojn de la riĉaj klasoj, gemotajlistoj , puntistinoj , brodistinoj , luksbindistoj , lukskudristinoj , dekoraciistoj de l'plezurdomoj ktp. (4)

-------

(3) Karlo Marks, "Kapitalo" (3a vol.)

(4) "La proporcio, laŭ kiu loĝantaro de iu lando estas uzata kiel servistaro je la servo de l'bonhavaj klasoj, signas la progreson de tiu lando en nacia riĉeco kaj civilizeco". (R.M.Martin. "Ireland before and after the Union" 1818). Gambetta, kiu forneis la socian demandon, de kiam li ne plu estis monbezona advokato de l'Procope-trinkejo, verŝajne volis aludi pri tiu senĉese kreskanta servista klaso, kiam li postulis ekregon de l'novaj socitavoloj.

Kaŭrinte en absoluta pigro kaj demoralizite de deviga ĝuado, la burĝaro, spite kion ĝi suferis pro tio, adaptiĝis al sia nova vivmaniero. Kun teruro ĝi konsideris ĉiun ŝanĝon. Vidante la mizerajn vivkondiĉojn rezignacie akceptitajn de la laborista klaso kaj la organan difektadon naskitan de la korupta pasio por laboro, ĝi ankoraŭ pli abomenis ĉiun labortrudon kaj ĝulimigon.

Ĝuste tiam, sen atenti la demoralizon, kiun la burĝaro trudis al si kiel socian devon, la proletoj enkapigis al si la ideon puntrudi la laboron al la kapitalistoj. Naivuloj, ili konsideris kiel seriozaj la teoriojn de l'ekonomikistoj kaj de l'moralistoj pri laboro kaj rimenligis al si la koksojn por puntrudi ties praktikadon al la kapitalistoj. La proletaro fiere montris sian devizon:"Kiu ne laboras, tiu ne manĝas". Liono en 1831 ribele ekstaris por "plumbo aŭ laboro". La federistoj de marto 1871 deklaris sian ribeladon Revolucio de l'laboro.

Al tiuj senbridiĝoj de barbara furiozo, detruanta ĉiujn burĝajn ĝuon kaj pigron, la kapitalistoj povis respondi nur per kruelega subpremo, sed ili sciis, ke, kvankam ili povis sufoki tiujn revoluciajn eksplodojn, ili ne dronigis en la sango de siaj gigantaj masakroj la absurdan ideon de l'proletaro puntrudi la laboron al la senfaraj kaj sataj klasoj kaj por eviti tiun malfeliĉon ili ĉirkaŭigis sin per pretoroj, policistoj, juĝistoj, provosoj, vivtenataj en laboreca senfareco.

Oni ne plu povas konservi iluzion pri la karaktero de la modernaj armeoj, ili estas konstante tenataj nur por premi "la internan malamikon"; tiel la fortikaĵojn de Parizo kaj Liono oni konstruis ne por defendi la urbon kontraŭ la eksterlandanoj, sed por frakasi ĝin en kazo de ribelo. Kaj se necesus senreplika ekzemplo, ni citu la armeon de Belgio, de tiu feliĉa lando de l'kapitalismo; ĝia neŭtraleco estas garantiata far la eŭropaj ŝtatpotencoj kaj tamen ĝia armeo estas unu el la plej fortaj kompare kun la loĝantaro. La gloraj batalkampoj de la brava belga armeo estas la ebenaĵoj de l'Borinaĵo (Borinage)kaj de Karlreĝo (Charleroi); en la sango de l'ministoj kaj de l'senarmilaj laboristoj la belgaj oficiroj hardas siajn spadojn kaj rikoltas siajn epoletojn. La eŭropaj nacioj ne havas naciajn armeojn, sed dungsoldatarojn; ili

protektas la kapitalistojn kontraŭ la popola furiozo, kiu volus kondamni ilin al dek horoj da minejo aŭ teksejo.

Do, premzonante sian ventron, la laborista klaso supermezure disvolvis la ventron de la burĝaro kondamnita al superkonsumado.

Por senpezigi sian penigan laboron, la burĝaro eltiris el la laborista klaso amason da homoj multe pli superan al tiu, kiu plu dediĉas sin al la utila produktado, kaj kondamnis ĝin siavice al malproduktiveco kaj superkonsumado. Sed tiu grego da senutilaj buŝoj, malgraŭ sia nesatigebla voremo, ne sufiĉas por konsumi ĉiujn varojn, kiujn la laboristoj, brutigate per la labor-dogmo, produktas kiel maniuloj, ne volante konsumi ilin kaj eĉ ne pensante, ĉu oni trovos homojn por ilin konsumi.

Fronte al tiu duobla frenezo de l'laboristoj, sin mortigi pro superlaboro kaj vegeti en l'abstinado, la granda problemo de la kapitalisma produktado ne plu estas trovi produktantojn kaj dekobligi iliajn fortojn, sed malkovri konsumantojn, stimuli iliajn apetitojn kaj krei al ili falsajn bezonojn. Pro tio ke la eŭropaj laboristoj, tremante pro frosto kaj malsato, rifuzas surporti la ŝtofojn, kiujn ili teksas, trinki la vinojn, kiujn ili rikoltas, la kompatindaj fabrikposedantoj devas kuri samkiel frenezuloj ĝis la antipodoj por serĉi, kiu surportos kaj kiu trinkos: jen centoj da milionoj kaj da miliardoj, kiujn Eŭropo eksportas ĉiujare en ĉiujn mondangulojn, al popoloj, kiuj per ili kion fari ne scias. (5)

Sed la esploritaj kontinentoj ne plu estas sufiĉe vastaj, necesas virgaj landoj. La eŭropaj fabrikestroj tagenokte revas pri Afriko, pri la Sahara lago, pri la Sudana

-------

(5) Du ekzemploj: la angla registaro, por komplezi al la hindiaj landoj, kiuj, malgraŭ la periodaj landplagantaj malsategoj, obstinas kultivi opipapavon anstataŭ rizon aŭ tritikon, devis entrepreni sangajn militojn por trudi al la ĉina registaro la liberan enkondukon de l'hinda opio. La Polineziaj sovaĝuloj, malgraŭ la rezultanta mortokvanto, devis sin vesti kaj ebriigi anglamaniere, por konsumi la produktojn de l'Skotlandaj distilejoj kaj de l'Manĉestraj teksejoj.

fervojo; angore ili sekvas la progresadon de l'Livingstone, Stanley, Du Chaillu, De Brazza; gape ili aŭskultas la miregindajn rakontojn de tiuj kuraĝaj vojaĝantoj. Kiom da nekonataj mirindaĵoj enhavas la "nigra kontinento"! Kampoj estas priplantitaj per elefantaj dentoj, riveregoj el kokosoleo flue kunportas orerojn, milionoj da nigraj pugoj, nudaj kiel la vizaĝo de Dufaure aŭ de Girardin, atendas la kotonaĵojn por eklerni la decon, botelojn da brando kaj bibliojn por ekkoni la virtojn de l'civilizacio.

Sed ĉio senpovas: manĝegaĉantaj burĝoj, servista klaso pli multnombra ol la produktiva, fremdaj kaj barbaraj nacioj, kiujn oni ŝtopas per eŭropaj varoj; nenio, absolute nenio povas sukcesi disvendi la montojn da produktoj, kiuj amasiĝas pli altaj kaj pli enormaj ol la egiptiaj piramidoj: la produktiveco de l'eŭropaj laboristoj defias ĉian konsumadon, ĉian malŝparegon. La fabrikestroj, freneziĝante, ne plu scias kie fronti, ili ne plu povas trovi la krudmaterialon por satigi la senbridan, koruptitan pasion de siaj laboristoj al laboro. En niaj lanproduktaj departementoj, oni disfibras la makulitajn kaj duonputrajn ĉifonojn, per ili oni faras t.n. renesancajn litotukojn, kiuj daŭras kiom daŭras la balotaj promesoj; en Liono, anstataŭ lasi al la silkeca fibro ties simplecon kaj naturan suplecon, oni superŝarĝas ĝin per mineralaj saloj, kiuj, aldonante al ĝi pezon, igas ĝin rompiĝema kaj mallonge uzebla. Ĉiuj niaj produktoj estas malpurigitaj por faciligi ties disvendiĝon kaj mallongigi ties daŭron. Nian epokon oni nomos la tempaĝo de l'falsado, samkiel oni nomis la unuajn epokojn de l'homaro la tempaĝo de l'ŝtono, la tempaĝo de l'bronzo, laŭ la naturo de ilia produktaĵaro. Sensciuloj akuzas pri fraŭdo niajn piajn industriistojn, dum efektive animas ilin la penso havigi laboron al la laboristoj, kiuj ne povas rezignacii vivi kun interplektitaj brakoj. Tiuj falsadoj, kies nura instigilo estas humana celo, sed kiuj enspezigas belegajn profitojn al la fabrikestroj kiuj praktikas ilin, kvankam ruinigaj por la vara kvalito, kvankam neelĉerpebla fonto de malŝparado de l'homa laboro, tiuj falsadoj pruvas la filantropian elpensemon de l'burĝoj kaj la teruran perversecon de l'laboristoj. Ĉi-lastaj, por satigi sian labor-malvirton, devigas ja la industriistojn sufoki la kriojn de sia konscienco kaj perforti eĉ la leĝojn de la komerca honesto.

Kaj tamen, spite la var-superproduktadon, spite la industriajn falsadojn, la laboristoj nenombreble embarasas la merkaton, petegante: laboron! laboron! Ilia superabundo devus devigi ilin bremsi sian pasion; malé, ĝi puŝas ĝin al paroksismo. Se jen aperas laborŝanco, ili impetegas sur ĝin; tiam dekdu, dekkvar horojn ili postulas por plene satigi sin, kaj la morgaŭon jen ili denove reĵetitaj al la pavimo, sen io por plu nutri sian malvirton. Ĉiujare, en ĉiuj industrioj, sendungadoj revenas kun sezona reguleco. La por la organismo mortigan superlaboron sekvas la plena ripozo dum du aŭ kvar monatoj; kaj ne plu da laboro, ne plu da nutraĵo. Tial, ĉar la labor-malvirto estas diable kejlita en la koro de l'laboristoj; ĉar la de l'socio postulata laborkvanto estas devige limigita de la konsumado kaj de la abundeco de l'krudmaterialo, kial forvori en ses monatoj la tutjaran laboron? Kial ne dispartigi ĝin egale inter la dekdu monatoj kaj devigi ĉiun laboriston kontentiĝi per ses aŭ kvin horoj ĉiutage dum la jaro, anstataŭ havi dekhorajn misdigestojn dum ses monatoj? Certigite pri sia ĉiutaga laborporcio, la laboristoj ne plu envios unu la alian, ne plu interbatalos por al si reciproke forpreni la laboron el la manoj kaj la panon el la buŝo; tiam ne lacaj korpe kaj mense, ili ekpraktikos la virtojn de l'pigro.

Stultigite de sia malvirto, la laboristoj ne povis kompreni tiun fakton, ke, por havi laboron por ĉiuj, necesas porciumi ĝin same kiel akvon sur ŝipo en danĝereco. Tamen la industriistoj, nome de la kapitalisma ekspluatado, jam de longe petis leĝan limigon de la labortago. Antaŭ la Komisiono de 1860 pri la profesia instruado, unu el la plej gravaj manufakturposedantoj el Alzaco, S-ro Bourcart, el Gebvilero (Guebwiller), deklaris: "ke la dekduhora labortago estas ekscesa kaj devus esti malplilongigita ĝis dek unu horoj. Mi povas konsili adopti tiun decidon, kvankam ĝi unuavide aspektas multekosta; de kvar jaroj ni eksperimentis ĝin en niaj industriejoj kaj kontentas pri ĝi, kaj la mezproduktado ne nur ne malpliiĝis, sed kreskis".

En sia studaĵo pri la <u>maŝinoj</u>, S-ro F. Passy citas el granda belga industriulo, S-ro M. Ottavaere la jenan leteron:

"Niaj maŝinoj, kvankam samaj kiel tiuj de la anglaj teksejoj, ne produktas kiom ili devus produkti kaj kiom

produktus tiuj samaj maŝinoj en Anglio, kvankam la teksejoj laboras du horojn malpli ĉiutage (...). Ni ĉiuj laboras du grandajn horojn troe; mi estas konvinkita, ke, se oni laborus nur dek unu horojn anstataŭ dektri, ni havus saman produktadon kaj sekve produktus pli ŝpareme".

Aliflanke, S-ro Leroy-Beaulieu asertas, ke "observis tion granda belga industriulo, ke la ferion enhavantaj semajnoj ne alportas malpli da produktado ol la ordinaraj semajnoj".(6)

Kion, trompite pro sia naiveco far la moralistoj, la popolo neniam aŭdacis, tion riskis fari aristokratia registaro. Neglektante la altajn moralajn kaj industriajn konsiderojn de la ekonomikistoj, kiuj, samkiel misaŭguraj birdoj, grakis, ke redukti je unu horo la laboron de l' fabrikoj estus per dekreto ruinigi la anglan industrion, la registaro de Anglio per strikte obeata leĝo malpermesis labori pli ol dek horojn ĉiutage; kaj tiel poste kiel antaŭe Anglio restas la unua industria nacio en la mondo.

La granda angla eksperimento, la eksperimento de kelkaj inteligentaj kapitalistoj jen pruvas nerefuteble, ke por potencigi la homan produktivon necesas malpliigi la laborhorojn kaj multigi la feriojn kaj pagdatojn, kaj la franca popolo ne estas konvinkita. Sed se modestega, duhora reduktado plialtigis en dek jaroj la anglan produktadon je ĉ. unu triono (7), kian vertiĝan disvolviĝon komunikos al la franca produktado leĝa reduktado de la labortago je tri horoj? Ĉu la laboristoj ne povas do kompreni, ke, trolaborante, ili elĉerpas sian forton kaj tiun de sia idaro; ke, eluzite, ili antaŭtempe atingas la aĝon malkapabli ĉiun laboron; ke, absorbite, brutigite per ununura malvirto, ili ne plu estas homoj sed hom-

---

(6) Paul Leroy-Beaulieu. "La Question ouvrière au XIVe siècle" (La laborista afero en la 14a jarcento).
(7) Jen, laŭ la fama statistikisto R. Giffen, el la Statistik-Buroo Londona, la kreskanta progresado de la nacia riĉeco de Anglio kaj Irlando en

1814 - ĝi estis - 55 miliardoj da frankoj
1865 - " - 162,5 "
1875 - " - 212,5 "

stumpoj; ke ili mortigas en si ĉiujn belajn kapablojn por lasi staranta kaj sukplena la nuran, furiozan laborfrenezon?

Ha! Kiel Arkadiaj papagoj ili ripetas la lecionon de l' ekonomikistoj: "Ni laboru, ni laboru por kreskigi la nacian riĉecon." Ho, idiotoj! ĉar vi tro laboras, tial la industria maŝinaro malrapide disvolviĝas. Ĉesu bleki kaj aŭskultu ekonomikiston: li ne estas aglo, estas nur S-ro Reybaud, kiun ni malbedaŭrinde perdis antaŭ kelkaj monatoj:

"Ĝenerale, laŭ la kondiĉoj de la manlaboro reguliĝas la revolucio en la labormetodoj. Tiel longe dum la manlaboro liveras siajn servojn etpreze, oni malavaras ĝin; oni strebas ŝpari ĝin, kiam ĝiaj servoj iĝas pli kostaj". (8)

Por devigi la kapitalistojn perfektigi siajn maŝinojn el ligno kaj fero, necesas altigi la salajrojn kaj malpliigi la laborhorojn de l'maŝinoj el karno kaj ostoj. La apogantajn pruvojn? Po centoj oni povas doni ilin. En la fadenindustrio la volvomaŝino (self acting mule) estis inventita kaj ekaplikita en Manĉestro, tial ke la ŝpinistoj rifuzis labori tiom longe kiom antaŭe.

En Usono la maŝino invadas ĉiujn fakojn de l'agrikultura produktado, de la buterfabrikado ĝis la tritiksarkado.Kial? Tial, ĉar la usonano, libera kaj pigra, pli ŝatus mil mortojn ol la bovinecan vivon de la franca kamparano. La plugado, tiel peniga en nia glora Francio, tiel lacdoloriga,estas en la usona Okcidento agrabla tempopasigilo en plenaero kiun oni ĝuas sidante, pigre fumante sian pipon.

## 4. Por nova ario, nova kanzono

Se, malpliigante la laborhorojn, oni havigas al la socia produktado novajn meĥanikajn fortojn, devigante la laboristojn konsumi siajn produktojn, oni havigos grandegan armeon da laborfortoj. La burĝaro, tiam senŝarĝigita el sia

-------

(8) Louis Reybaud. "Le Coton, son régime, ses problèmes". (La kotono, ĝia reĝimo, ĝiaj problemoj) 1863.

tasko de universala konsumanto, rapidos maldungi la amasegon da soldatoj, juĝistoj, parigistoj ktp, fortiritan el la utila laboro por helpi ĝin konsumi kaj malŝpari. Tiam la labormerkato estos plenplena, tiam necesos fera leĝo por malpermesi la laboron: estos neeble trovi laboron por tiu amasego da antaŭe neproduktivaj uloj, pli multnombraj ol la arbaraj pedikoj. Kaj poste necesos pensi pri ĉiuj, kiuj provizis iliajn frivolajn kaj multelspezigajn bezonojn kaj emojn. Kiam ne plu estos lakeoj nek generaloj galonotaj, ne plu liberaj kaj edzinigitaj prostituitinoj puntkovrotaj, ne plu kanonoj borotaj , ne plu palacoj konstruotaj, necesos per severaj leĝoj trudi al la gelaboristoj pri pasamentaĵoj, pri puntoj, pri fero, pri konstruaĵoj, higienan remadon kaj dancekzercojn por ilia resaniĝo kaj la perfektiĝo de la raso. Ĉar tiam la eŭropaj produktoj surloke konsumataj ne plu estos transportataj malproksimegen, ja necesos, ke la maristoj, la skipanoj, la kamionistoj eksidu kaj eklernu kiel pigri. La feliĉaj Polinezianoj tiam povos sin dediĉi al libera amorado sen timi la piedfrapojn de la civilizita Venuso kaj la predikojn de la eŭropa moralo.

Sed estas io plia. Por trovi laboron por ĉiuj senvaloruloj de la nuna socio, por lasi la industrian maŝinaron senlime disvolviĝi, la laborista klaso devos, kiel la burĝaro, perforti siajn abstinajn emojn kaj senlime disvolvi siajn konsumkapablojn. Anstataŭ manĝi ĉiutage unu aŭ du uncojn da ledsimila viando, kiam ĝi viandon manĝas, ĝi manĝos ĝojajn bifstekojn unu aŭ dufuntajn; anstataŭ modere trinki malbonan vinon pli katolikan ol la papo, ĝi trinkos grandajn kaj profundajn glasplenojn da bordoza, burgonja vinoj sen industria baptado kaj lasos la akvon al la bestaro.

La proletoj decidis en sia kapo puntrudi al la kapitalistoj dekhorajn tagojn da forĝado kaj rafinado; tie estas la granda eraro, la kaŭzo de l'sociaj antagonismoj kaj de l'civilaj militoj. Malpermesi sed ne trudi la laboron, tion necesos fari. Al la Rothschild-oj, Say-oj,oni permesos pruvi, ke ili estis sian tutan vivon perfektaj sentaŭguloj; kaj se ili ĵuros voli pluvivi kiel perfektaj sentaŭguloj, malgraŭ la ĝenerala delogado por laboro, ili estos surŝlipigitaj kaj ĉe siaj respektivaj urbodomoj ili ricevos ĉiumatene dudekfrankan moneron por siaj plezur-

etoj. La sociaj malakordoj svenos. La rentuloj, la kapitalistoj, kiel unuaj, aliĝos al la popola partio, kiam ili estos konvinkitaj, ke, tute ne volante ilin suferigi, male oni volas liberigi ilin de la laboro superkonsumi kaj malŝpari, per kiu ili estis ŝarĝitaj tuj de sia naskiĝo. Pri la burĝoj nekapablaj pruvi siajn titolojn sentaŭguloj,oni lasos ilin sekvi siajn instinktojn: ekzistas sufiĉe da naŭzaj metioj por loki ilin - Dufaure purigus la publikajn necesejojn; Gallifet mortigus la skabiajn porkojn kaj la ŝvelajn ĉevalojn; la membroj de la pardonkomisiono, sendite al Poissy (centra malliberejo, Ndt.), markus la buĉotajn bovojn kaj ŝafojn; la senatanoj, ataŝeoj pri funebraĵoj, rolus kiel enterigistoj. Por aliuloj oni trovus metiojn respondantajn al ilia inteligento. Lorgeril, Broglie, korkus la ĉampanbotelojn, sed oni buŝumus ilin por malhelpi, ke ili ebriiĝu; Ferry, Freycinet, Tirard detruus la cimojn kaj la fiinsektojn de l'ministerioj kaj aliaj publikaj gazetoj. Tamen necesos meti la publikajn financojn ekster la atingeblon de l'burĝoj, pro la akiritaj kutimoj.

Sed severan kaj longan revenĝon oni suferigos al la moralistoj, kiuj koruptis la homan naturon, al la fibigotoj, la denuncistoj, la hipokrituloj..."kaj aliaj tiaj sektoj de homoj, kiuj sin maskovestis por trompi la popolon. Ĉar lasante la ordinaran homon kredi, ke ili estas okupataj ĉu en kontemplado kaj devotado, en fastado kaj macerado de l' voluptemo, ĉu vere por nutrosubteni la fragilecon de sia homeco, kontraŭe, ili manĝas, Dio scias kiom! et Curios simulant sed Bacchanalia vivunt (1). Tion vi povas legi diklitere kaj miniature laŭ iliaj ruĝaj nazoj kaj elstaraj ventroj, aŭ kiam ili parfumas sin per sulfo". (2)

La tagojn de grandaj popolaj festoj, kiam, anstataŭ englutí polvon kiel en la 15aj de Aŭgusto kaj 14aj de Julio de l'burĝismo, la komunistoj kaj la kolektivistoj cirkuligos la pokaletojn. Tiam la membroj de la Akademio de l' moralaj kaj politikaj sciencoj, la long- aŭ mallongrobaj pastroj de la eklezioj ekonomia, katolika, protestanta, juda, pozitivista kaj liberpensa, la propagandistoj de l' maltusanismo kaj de l'moralo kristana, altruista, sende-

---

(1) Ili simulas kuriusojn kaj vivas kiel en Bakĥanalio. (Juvenalo)

(2) Pantagruelo (Rabelezo) l.II, ĉap. LXXIV.

penda aŭ submetita, flave vestitaj, tenos la kandelon ĝis bruli al si la fingrojn kaj vivos malsataj apud la gallaj virinoj kaj la tabloj ŝarĝitaj per viandoj, fruktoj kaj floroj, kaj soifegos apud la malŝtopitaj bareloj. Kvarfoje jare, je la sezonŝanĝiĝo, oni enfermos ilin en la grandaj radoj, samkiel la hundoj de l'akrigistoj, kaj oni kondamnos ilin mueli venton dum dek horoj. Samen punon suferos la advokatoj kaj leĝistoj.

En reĝimo de pigro, por mortigi la tempon (°), kiu mortigas nin sekundon post sekundo, ĉiame okazos spektakloj kaj teatroludoj; jen tuttrovita tasko por niaj leĝofaraj burĝoj. Oni organizos ilin laŭ bandoj vizitantaj foirojn kaj vilaĝojn, prezentantaj spektaklojn pri leĝofarado. La generaloj, kun rajdistaj botoj, brustoj pasamentitaj per laĉornamaĵoj, kraĉaĵoj, krucoj de Honor-Legio, iros tra stratoj kaj placoj, rekrutante la bonan popolon. Gambetta kaj Cassagnac, lia kunulo, logparolos ĉe la pordo. Cassagnac, en granda kostumo de bravulaĉo, okulruladante,kraĉante flamantan stupon, minacos ĉiujn per siapatra pistolo kaj malaperos en truon tuj kiam oni montros al li la portreton de Lullier;. Gambetta parolados pri eksterlanda politiko, pri la eta Grekio, kiu doktorigas ĝin kaj ekfajrigus Eŭropon por friponi Turkion; pri la granda Rusio,kiu stultigas lin per la kompoto, kiun ĝi promesas fari el Prusio kaj kiu deziras vundojn kaj kontuzojn okcidente de Eŭropo por libere agi oriente kaj strangoli la nihilismon enlande; pri S-ro Bismark, kiu kompleze permesis al li sin esprimi pri l'amnestio.... poste, nudigante sian larĝan, je l'tri koloroj ŝmiritan ventron, li sur ĝin tamburos la alvokon kaj detalos la bonegajn bestetojn, la hortulanojn, la trufojn, la glasojn da Margaux (Margo) kaj Yquem(Ikem), kiujn li englutegis por kuraĝigi la agrikulturon kaj ĝojigi la balotantojn de Belvilo (Belleville).

En la barako oni komencos per "La Balota Farso".

Antaŭ la lignokapaj kaj azenorelaj balotontoj, la burĝaj kandidatoj, pajace vestite, dancos la dancon de l'politikaj liberoj, viŝpuriganțe al si la vangojn kaj sidvangojn per siaj multpromesaj balotprogramoj kaj parolante kun larmantaj okuloj pri la popola mizero kaj kun kupra

------

(°) laŭ la franca = pasigi la tempon . Ndt.

voĉo pri la gloro de Francio; kaj jen ĥore kaj firme azenblekos la kapoj de l'balotontoj: "Hi han! Hi han!".

Poste komenciĝos la granda ludo: "La Priŝtelado de l' naciaj posedaĵoj".

La kapitalisma Francio, enorma femalo, kun harkovrita vizaĝo kaj kalva kranio, senenergia, kun karno molaĉa, pufa, palega, kun estingitaj okuloj, dormema kaj oscedanta, ekkuŝas sur velura kanapo; ĉe ŝiaj piedoj, la industria Kapitalismo, giganta fer-organismo, kun simieska masko, meĥanike voras virojn, virinojn, infanojn, kies funebrecaj kaj korŝiraj krioj plenigas la aeron; la Banko foinmuzela, hienkorpa kaj harpimana, lertamove rabas al ĝi la centsoldajn monerojn el la poŝo. Hordoj da mizeraj proletoj, senkarnaj, ĉifonvestite , eskortate de ĝendarmoj kun elingitaj glavoj, pelate de furioj, kiuj vipas ilin per la vipoj de l'malsato, alportas ĉe la piedojn de la kapitalisma Francio amasojn da varoj, barelojn da vino, sakojn da oro kaj tritiko. Langlois, kun sia pantalono en unu mano, la testamento de Proudhon en la alia, kaj la buĝetlibro inter la dentoj, fiere lokiĝas ĉe la kapon de l'defendantoj de la naciaj posedaĵoj kaj gardostaras. Kiam demetitaj la ŝarĝoj, per kolbo- kaj bajonet-frapoj ili forpelas la laboristojn kaj malfermas la pordon al la industriistoj, al la komercistoj kaj al la bankieroj. Konfuze ili impetas sur la amason, glutante kotonaĵojn, tritiksakojn, orbrikojn, malplenigante barelojn; ŝtoplacegaj, malpuraj, naŭzaj, ili ekfalas en siajn rubaĵojn kaj siajn vomaĵojn... Tiam ektondras, la tero ŝanceliĝas kaj fendiĝas, ekaperas la historia Fato; per sia ferpiedo ĝi distretas la kapojn de tiuj, kiuj singultas, stumblas, falas kaj ne plu povas fuĝi, kaj per sia larĝa mano ĝi renversas la mirstultan kaj timŝvitantan, kapitalisman Francion.

Se, elradikigante el sia koro la malvirton, kiu superregas ĝin kaj malnobligas ĝian naturon, la laborista klaso ekstarus en sia terura forto, ne por postuli la <u>Homajn Rajtojn</u>, kiuj estas nur la rajtoj de la kapitalista ekspluatado, ne por postuli la <u>Rajton al laboro</u>, kiu estas nur la rajto al mizero, sed por forĝi bronzan leĝon malpermesantan al ĉiu homo labori pli ol tri horojn ĉiutage, la Tero, la malnova Tero, tremante pro ĝojego, sentus boli en si novan universon... Sed kiel peti de proletaro koruptita de la kapitalista moralo, virecan decidon?

Kiel Kristo, la plendema personiĝo de l'antikva sklaveco, la virinoj, la infanoj de l'Proletaro pemige grimpadas de unu jarcento la kalvarian vojon de l'doloro: de unu jarcento la deviga laboro rompas iliajn ostojn, kontuzas ilian karnon, turmentas iliajn nervojn; de unu jarcento la malsato tordas iliajn stomakojn kaj halucinas iliajn cerbojn!... Ho, Pigro, kompatu nian longan mizeron! Ho, Pigro, patrino de l'artoj kaj de l'noblaj virtoj, estu la balzamo de l'homaj angoroj!

# Apendico

Niaj moralistoj estas ja modestuloj; se ili elpensis la dogmon de laboro, ili dubas pri ĝia efikeco por trankviligi la animon, ĝojigi la spiriton kaj prizorgi la bonan funkciadon de l'renoj kaj aliaj organoj; ili volas eksperimenti ties uzadon por la popolo, in anima vili, antaŭ ol turni ĝin kontraŭ la kapitalistoj, kies malvirtojn ili havas la mision ekskuzi kaj permesi.

Sed, filozofoj po kvar soldoj por dekduo, kial tiel cerbumaĉi por starigi moralon, kies praktikadon vi ne kuraĝas konsili al viaj mastroj? Ĉu vian labor-dogmon, pri kiu vi tiom fieras, vi volas vidi ofendmokata, malhonorata? Ni malfermu la historion de l'antikvaj popoloj kaj la verkaĵojn de iliaj filozofoj kaj leĝofarantoj.

"Mi ne povus aserti, diras la patro de l'Historio, Herodoto, ke la Grekoj dankas al la Egiptoj la malŝaton al laboro, ĉar mi trovas la saman malŝaton reganta ĉe la Tracoj, la Scitoj, la Persoj, la Lidianoj; unuvorte, tial ke ĉe la plimulto el la barbaroj, tiuj, kiuj lernas la meĥanikajn artojn, kaj eĉ iliaj infanoj estas konsiderataj kiel la lastrangaj el la civitanoj... Ĉiuj Grekoj estis edukitaj laŭ tiuj principoj, ĉefe la Lacedemonanoj". (1)

"En Ateno, la civitanoj estis veraj nobeloj, kiuj devis zorgi nur pri la defendo kaj la administrado de l'komunumo, kiel la sovaĝaj militistoj el kiuj ili originis.

-------

(1) Herodoto, vol.II.

Devante do "la tutan tempon esti liberaj por prizorgi,per sia intelekta kaj korpa forto, la interesojn de la Respubliko, ili ŝarĝis la sklavojn per ĉiu laboro. Same, en Lacedemono, eĉ la virinoj devis nek ŝpini nek teksi por ne malnobeliĝi". (2)

La Romianoj konis nur du noblajn kaj liberajn metiojn, la agrokulturon kaj la armeon; ĉiuj civitanoj rajte vivis je la kostopago de l'Trezorejo. Oni ne povis devigi ilin perlabori sian vivon per iu ajn el la "sordidoe artes" (tiel ili nomis la metiojn), kiuj rajte apartenis al la sklavoj. Bruto, la Malnova, por ribeligi la popolon, ĉefe akuzis Tarkvinon, la tiranon, ke li faris el liberaj civitanoj metiistojn kaj masonistojn. (3)

La antikvaj filozofoj interdisputis pri la origino de l' ideoj, sed ili interkonsentis, se temis abomeni la laboron.

"La naturo, diris Platono, en sia socia utopio, en sia modela "Respubliko", la naturo faris nek ŝuiston, nek forĝiston; tiaspecaj okupoj malnobligas la personojn, kiuj havas ilin, malnoblajn dungsoldatojn, sennomajn mizerulojn, kiuj pro sia stato mem estas senigitaj je politikaj rajtoj. Koncerne la komercistojn kutimantajn mensogi kaj trompi, oni toleras ilin en la civito nur kiel necesan malbonon. La civitano, kiu malnobligas sin per la butikkomerco,estos persekutata pro tiu delikto.
Se kulpa, li estos kondamnita je unu jaro da karcero. La puno estos duobla je ĉiu rekulpiĝo". (4)

En sia "Ekonomiko" Ksenofono skribis:

"La personojn, kiuj sin dediĉas al manlaboroj, oni neniam enoficigas kaj oni ja pravas. La plimultaj, kondamnite sidi la tutan tagon, kelkaj eĉ antaŭ senĉesa fajro, ne povas eviti difektiĝon de l'korpo kaj estas ja malfacile, ke la spirito pro tio ne suferu".

Kio honorinda povas eliĝi el butiko, deklaras Cicerono, kaj kion honestan povas produkti komerco? Ĉio nomita butiko ne indas je honestulo (...) ĉar la komercistoj ne povas

---

(2) Biot. "De l'abolition de l'esclavage ancien en Occident" (Pri la abolo de l'antikva sklaveco en Okcidento) 1840.
(3) Tito-Livio, Libro I. - (4) Platono. "Respubliko" I,V.

gajni sen mensogi, kaj kio pli hontinda ol mensogo! Oni devas do konsideri kiel ion malnoblan kaj trivialan la metion de ĉiuj, kiuj vendas sian penon kaj sian laboron; ĉar kiu ajn donas sian laboron por mono, tiu vendas sin mem kaj sin lokas ĉe la rangon de l'sklavoj". (5)

Proletoj, brutigitaj per la dogmo de laboro, ĉu vi komprenas la lingvaĵon de tiuj filozofoj, kiujn oni zorge kaŝas al vi: - Civitano, kiu donas sian laboron por mono, malnobligas sin al la rango de l'sklavoj, li faras krimon, kiu indas jarojn da karcero?

La kristana hipokrito kaj la kapitalista utilismo ne perversigis tiujn filozofojn de la antikvaj Respublikoj; in esprimante por liberaj homoj, ili naive diris sian opinion. Platono, Aristotelo, tiuj gigantaj pensuloj, kies maleolon povas atingi niaj Cousin, Caro, Simon, nur levigante sur la piedpintoj, volis, ke la civitanoj de iliaj idealaj Respublikoj vivu en la plej granda senokupeco, ĉar, aldiris Ksenofono "la laboro rabas la tutan tempon kaj pro ĝi oni havas nenian libertempon por la Respubliko kaj la amikoj". Laŭ Plutarko, la granda merito de Licurgo, "la plej saĝa el la homoj" kaj pro tio admirata de l'posteularo, estis, ke li konsentis libertempojn al la civitanoj de l'Respubliko, malpermesante al ili ĉiun ajn metion. (6)

Sed, respondos la Bastiat, Dupanloup, Beaulieu kaj Kompanio de la kristana kaj kapitalista moralo, tiuj pensuloj, tiuj filozofoj rekomendis la sklavecon. - Jes ja, sed ĉu povis esti alie en la ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj de ilia epoko? La milito estis la normala stato de l'antikvaj socioj; la libera homo devis dediĉi sian tempon por pridiskuti la aferojn de l'Ŝtato kaj zorgi pri ties defendo; la metioj estis tiam tro primitivaj kaj tro krudaj por ke, praktikante ilin, oni povu plenumi ankaŭ sian soldatan kaj civitanan metion; por havi metiistojn kaj civitanojn, la filozofoj kaj la leĝofarantoj devis toleri la sklavojn en la heroaj Respublikoj.
- Sed ĉu la moralistoj kaj la ekonomikistoj de l'kapital-

-------

(5) Cicerono: "Pri la devoj" - I, tit.II, ĉap. XLII.
(6) Platono: "Respubliko" V kaj "Leĝoj" III; Aristotelo: "Politiko" II kaj VII; Ksenofono: "Ekonomiko" IV kaj VI; Plutarko: "Vivo de Licurgo".

ismo ne rekomendas la salajrecon, la modernan sklavecon? Kaj al kiuj homoj la kapitalisma sklaveco donas libertempojn? - Al Rothschild-oj, al Schneider-oj, al S-inoj Boucicaut, senutilaj kaj malutilaj, sklavaj de siaj malvirtoj kaj de siaj servistoj.

"La antaŭjuĝo pri sklaveco regis la spiriton de Pitagoro kaj de Aristotelo", oni malŝateme skribis; kaj tamen Aristotelo antaŭvidis, ke

"Se ĉiu ilo povus sen ordono, aŭ per si mem, plenumi sian propran funkcion, sankiel la ĉefverkoj de Dedalo per si mem moviĝis, aŭ sankiel la tripiedoj de Vulkano spontane komencis sian sanktan laboron; se, ekzemple, la navedoj de l'teksistoj teksus per si mem, la laborestro ne plu bezonus helpantojn, kaj la mastro sklavojn".

La revo de Aristotelo estas nia realo. Niaj fajrospiraj, ŝtalmembraj maŝinoj, nelacigeblaj, kun mirinda, neelĉerpebla fekundeco, obeeme plenumas per si mem sian sanktan laboron; kaj tamen la genieco de la grandaj filozofoj de l' kapitalismo restas superregata de la antaŭjuĝo pri salajreco, la plej aĉa el la sklavecoj. Ili ankoraŭ ne komprenas, ke la maŝino estas la savanto de l'homaro, la Dio, kiu elaĉetos la homon el la "sordidoe artes" kaj el la salajrata laboro, la Dio, kiu havigos al ĝi ripozon kaj liberon.

Paŭlo Lafargue.
(Pigre E-igis Kribo)

En la sama serio de SAT-Broŝurservo
(La Juna Penso, F 47340 Laroque) :

*************************************

* Lanti: Adamaĵoj
* Pannekoek: Antropogenezo
* J.Duboin/PV.Berthier: Abundo kaj konsumsocio
* Malatesta: Anarkio kaj organizo kaj aliaj tekstoj
* Balkanski: La Bazoj de Anarkiismo
* HD.Thoreau: Civila Malobeemo
* Pario: Durruti, simbolo de la hispana revolucio
* Kropotkin: Etiko I
* Jack London: La forto de la fortaj
* Krishnamurti: Fronte al la Vivo
* O.Wilde: La homa animo sub socialismo
* Pannekoek: Historia Materiismo. Socia organizado
* E.Relgis: Humanitaristaj Principoj
* Han Riner: Individuismo en Antikveco
* C.A.Laisant: La Parlamentisma Iluzio
* Han Riner: Individuisma Manlibreto
* Sébastien Faure: La Krimoj de Dio
* Lanti: La laborista esperantismo
* Diversaj aŭtoroj: La liberecana penso
* Fontaura/Grave: Liberecanaj vivkonceptoj
* Han Riner: La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes
* P.de Cazenove: La migrantoj en Francio nuntempe
* La Boétie: Memvola Servuto
* Bartelmes: Mia vivo. Artikolaro. Poemaro.
* Roza Luksemburg: Naciecaj Problemoj
* T.Ebert: Ĉu neperforta revolucio aŭ liberiga milito?
* E. Bellamy: Parabolo pri la Cisterno
* Paul Lafargue: La rajto de pigro
* Han Riner/Alain (trad. Lanti): Por nia medito
* M.A.N. : Politika Neperforto
* Domela-Nieuwenhuis: La Piramido de l'Tiranismo
* Kropotkin: Revolucia Registaro. La Pariza Komunumo,ktp.
* W.Schmid: La rentumo, kiun ni pagas
* J.Burger: Rido sanigas!
* Lanti: El verkoj de E.Lanti
* Han Riner: La Veraj Interparoladoj de Sokrato (tr.Lanti)

* kaj aliaj titoloj... Liston petu!

*************************************************************

Gérant & imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque Timbaut.